

Enskribo

pri la unua komitata kunveno okazinta la 1.II.1955 en la klubejo je la 22.15 h. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Friedrich, Adamcová, prof. Scheiber, Borkovec, inĝ. dro Šikula kaj Kořínek. Post la malfermo s-ano Kořínek tralegas la sekretarian raporton por la jarkunveno, kiu estis ĉiesvoĉe aprobita. Same ricevas aprobon la kasista raporto de s-ano Borkovec. Enspezoj estis 3111.44 Kčs, elspezoj 3069.09 Kčs, plusa saldo estas Kčs 42.39. S-ano Vondroušek proponas la kandidat-liston por la novelekto de komitato. S-ano Vondroušek raportas, ke pagis ĝis hodiaŭ 75 anoj. Oni decidis kontroli la staton de la propagandaj kestoj en la stacidomo, por kiuj ni estas pagontaj 126 Kčs. S-ano Friedrich promesas viziti gimnaziestron en Kr. Pole koncerne libron de direktoro Fridrich.

Finite je la 23.¹⁵.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 2a komitata kunveno okazinta la 8.II.1955 je la 21.35 horo, post la ĝenerala jarkunveno en la klubejo en hotel Slovan.

Por la ĵus elektitaj estraranoj estis disdividitaj jenaj funkcioj. Aparte de la ĝen. kunveno kiel prezidanto estis elektita s-ano Josef Vondroušek. Komisiitaj funkcioj estas: vicprezidanto s-ano Josef Friedrich, unua sekretario Jiří Kořínek, dua sekretario Marie Adamcová, kasisto Tomáš Borkovec, bibliotekistino Nelly Zitová, artprogramaj aferoj s-ano prof. Vilibald Scheiber, sekcio Junularo Drahomíra Chlubnová kaj Jan Werner, estrarano inĝ. Dro Jaromír Šikula, revizoroj Miroslav Němec kaj Sáva Střelec.

Finite je la 22.²⁰.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 3a komitata kunveno okazinta la 14an de junio 1955 en la klubejo en hotelo Slovan je la 22 h. Ĉeestis gesamideanoj J. Vondroušek, J. Friedrich, M. Adamcová, Dro. inĝ. J. Šikula, T. Borkovec, J. Kořínek, J. Werner.

S-ano Vondroušek raportas pri la laŭinvita vizito de niaj prezidanto kaj vicprezidanto en la komitata kunveno de Domo de Kulturo. Laŭ novaj statutoj estis de ni postulata pli strikta kontroliteco de nia agado. Ni devos transdoni stampilojn kaj stampilon "poŝtafranko paŭŝalita", transdoni al ili nian kason, de kiu ili disponigos al ni necesajn sumojn. Ĉiuj leteroj devos esti ankaŭ de ili subskribataj kaj do antaŭe aprobataj. Tutan aprobon bezonos ankaŭ ĉiuj niaj klubaj programoj kaj bultenoj. Oni povas postuli antaŭmeton de tekstoj de projektataj prelegoj. La komitato akceptas ĉi tiujn kondiĉojn. S-ano Vondroušek plue raportas, ke pagis 144 membroj. Li instigas, ke oni redonu la ĉe membroj deponitajn librojn al nia librejo. S-ano Friedrich komunikas, ke al gimnazio en Kr. Pole por libroj postrestintaj de dir. Fridrich li estas invitita veni en la dua duono de junio. S-o Vondroušek konigis, ke el la lasta de li gvidita kurso aliĝis 23 anoj: S-ano Borkovec sciigis la staton de nia kaso: kontante Kčs 51.01, en la ŝparkaso Kčs 832.41 (Finite) S-ano Vondroušek estas komisiita partopreni la laborkonsiliojn de Domo de Kulturo. - Finite je la 23a h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 5a komitata kunveno okazinta la 8an de novembro 1955 en la klubejo en hotelo Slovan. Komence je la 22-a horo. Ĉeestis ge-sanoj Vondroušek, Friedrich, inĝ. dro Šikula, Borkovec, Werner, Adamcová, Zitová kaj Kořínek. Estis pritrakitaj temoj 1) eldonado de Pacdefendanto kaj 2) vizito de s-ano prof. Canko Murgin. S-ano R.Burda proponis al s-ano J. Ballay, ke li eldonadu sub firmo de nia klubo la Pacdefendanton, ĉar s-ano Burda jam tre enŝuldiĝis per ĝia aperigado. Li jam sendigis la multobligilon al s-ano Ballay ne atendante nian decidon. Estis konstatite, ke ne eblas sub nia firmo la gazeton eldonadi, ĉar ni ne atingus permeson ĉe Domo de la Kulturo, nek aprobon ĉe la oficoj eldoni tian kvanton (pli ol mil) da ekzempleroj. Ni ja devas antaŭmeti ĉiujn leterojn al stampado ĉe Domo de Kulturo kaj ne eblas kaŝteni la veran kvanton. Ni tial unuanime rifuzis kaj informos tiusence s-anon Burda. Pro tri kaj duontaga vizito de s-ano Murgin ni estis komence iom embarasitaj, ĉar ĉefe financa flanko faris al ni zorgojn, ĉar nia kaso estas preskaŭ malplena. Sed dank' al laŭdinda iniciato de s-ano inĝ. Dro Šikula la afero estis kontentige solvita, ĉar s-anon prof. C. Murgin, kiu estas scienca laboranto ĉe la Karl Marx-universitato en Sofio, invitis kaj gastigos tri tagojn la Agrikultura Altlernejo, kie li prelegos lunde posttagmeze kaj vespere en la aŭlo. Tiujn prelegojn interpretos s-ano Vondroušek. Marde li parolos en nia klubo. Pri merkreda vespero traktos ankoraŭ s-ano Šikula kun Societo por disvastigo de politikaj kaj sciencaj konoj. S-ano Kořínek estis komisiita prizorgi la stencilitajn invitilojn.

Finite je la 23a horo.

Enskribis Jiří Kořínek